# Norvega Esperantisto

ESPERANTOBLADET

| N-ro 3 1971 | ORGANO DE NORVEGA ESPERANTISTA LIGO ĈEFREDAKTORO: JOHAN HAMMOND ROSBACH | 3-a periodo 37-a (42-a) jaro Monata |
|---|---|---|


## La 42a Norvega Esperanto-Kongreso

### Kunvoko

Per ĉi tio ni kunvokas la 42an landan kongreson de Norvega Esperantisto Ligo en Kafé Solfeng, Schirmersgt. 5, Trondhejmo, la 29.—31. de majo 1970. La unua laborkunsido komenciĝos la 30an de Majo je la 9.00.

Tagordo:

1. Malfermo per la prezidanto.
2. Elekto de kunvenaj funkciuloj (protokolantoj, kunvena prezidanto, elekta komisiono, komisiono por plenrajtoj kaj voĉnombrado).
3. Jarraportoj 1969 kaj 1970.
4. Jarkalkuloj 1969 kaj 1970.
5. Alvenintaj proponoj (statutaldono [vidu sube], rezolucioj).
6. Nia informa, propaganda kaj varbada agado, kaj kiel konservi la novajn esperantistojn por la movado.
7. Elekto de Liga Konsilantaro, inkluzive de Estraro, anstataŭantoj kaj revizoroj.
8. Eventualaĵoj.

Jarraporto kaj jarkalkuloj pri 1970 troviĝas aliloke en ĉi tiu numero.

*Pri la punktoj 3 kaj 4.* Ĉar ne okazis landa kunveno en 1970, la jarraporto kaj jarkalkuloj pri 1969 ne estas traktitaj kaj aprobitaj de landa kunveno. La raportoj kaj kalkuloj pri 1969 kaj 1970 estas egale redaktitaj. La Estraro proponas legi nur tiujn pri 1970 dum la ĉi-jara kunveno, sed petas la membrojn tralegi antaŭe tiujn pri 1969 en Norvega Esperantisto 4/1970, tiel ke oni povu ambaŭ jarojn kune pritrakti.

*Pri punkto 5.* Laŭ alveninta peto la Estraro proponas jenan aldonon al la statuto, § 6, post la dua punkto: «Likeså kan styret i særskilte tilfeller innrømme pensjonister medlemskap for lavere kontingent.» — Oni antaŭvidas proponojn ankaŭ pri unu aŭ pluraj rezolucioj.

*Pri punktoj 6.* La diskutoj dum la du pasintaj kongresoj pri la demando kiel aktivigi la movadon

kaj kreskigi la membronombron ne kondukis al gravaj rezultoj. La Estraro decidis ĉi-foje ataki la problemon de alia, pli konkreta flanko.

La Liga Estraro atentigas ke nia nunjara kongreso celebros la 60-jaran jubileon de nia Ligo. Ni admonas ĉiujn klubojn sendi reprezentantojn al la landa kongreso, kaj esperas ke ankaŭ multaj rektaj membroj ĉeestos. Detala programo venos en la venonta numero, aŭ en cirkulero. *La Liga Estraro.*

## La laborplano de N. E. L.

(Fino)

Ĉapitro VI temas pri Disvastigo. Ĝi havas tri punktojn:

1. «Celkonscia daŭrigo de informado kun atento al Norvegaj cirkonstancoj kaj al la Principaro de Frostavallen.» Informado pri Esperanto estas la tasko ne nur de la Informa Fako kaj de ĝiaj reprezentantoj, sed de ĉiu esperantisto. Oni devas uzi ĉiun konvenan okazon por informi al homoj pri nia lingvo, per prelgoj, per la gazetoj kaj en interparoloj, aŭ per disdono de broŝuroj kaj flugfolioj. Sed oni ne trudu la informojn al la homoj, nur donu kiam la okazo estas favora. Se vi ne havas sufiĉe da materialo, turnu vin al N.E.L.. La Principaro de Frostavallen indikas kiel oni procedu en la informlaboro. Vi trovas ĝin en la Jarlibro de U.E.A. por 1965 aŭ en la broŝuro Statuto kaj Regularoj de U.E.A..

2. «Daŭrigo kaj plifortigo de klopodoj por enirigi Esperanton en la lernejojn.» Jen la tasko precipe de niaj instruistaj membroj. Estas priplorinde ke neniu el ili eluzis la eblecon starigi eksperimentajn klasojn kun Esperanto, kiun kreis la eksperimentoj faritaj de lektoro Rosbach kaj de nia prezidanto. Ni forte admonas la instruistojn nun fari iniciaton tiurilate. Turnu vin al N.E.L. pri materialo.

3. «Speciala atento pri la junulara kaj pri studentoj ĉe universitatoj kaj altlernejoj.» Estas evidente ke ni multe tro malmulte faris por interesigi la junularon kaj altiri ĝin al nia laboro. Ĉe la universitato en Oslo fondiĝis Studenta Esperanto-Societo, kiu bone laboras, sed kiel estas ĉe la aliaj universitatoj kaj altlernejoj? Jen granda kaj ege grava tasko por niaj kluboj kaj membroj.

Ĉapitro VII temas pri Junularo. Ĝi havas du punktojn:

1. «Instigado al starigo de Esperanto-Junulara Organizo Norvega kiel sekcio de N.E.L. kaj de TEJO. Atentado pri la neceso doni lokon al la junularo en ĉiaj estraroj kaj komitatoj.» En 1970 ĉiuj junulaj membroj de N.E.L. estis unuigataj en Junularan Sekcion, sed la plej multaj el ili estas unuopaj membroj en kluboj, la kontakto estas nesufiĉa, kaj la sekcio ankoraŭ ne estas matura por aliĝo al TEJO. Nur se en pluraj kluboj oni starigos apartajn junulajn grupojn, la situacio provos pliboniĝi. Estas tre grave doni lokon por reprezentanto de tia grupo en la kluba estraro.

2. «Instigado al kapablaj junaj membroj fariĝi junulardelegitoj de U.E.A. kaj de TEJO.» Nia lando havas hodiaŭ eĉ ne unu junularan delegiton!

Finvortoj: «Ĉi tiu laborplano validos ĝis landkunveno de N.E.L. decidos pri ŝanĝoj aŭ tute nova plano.»

Jen viaj taskoj! La estraro esperas ke ĉiu studos la lobarplanon kaj faros sian eblon por plenumi ĝiajn punktojn por la prosperigo de Esperanto en nia lando.






## Norvega Esperantisto

ESPERANTOBLADET

*Redakcio:* Johan Hammond Rosbach, Hans Amund Rosbach.

*Adreso de la redakcio:* Hulderveien 17 B, N-1700 Sarpsborg. — (Limdato por manuskriptoj: la 20. en la monato antaŭ la apero.

*Abonprezo:* En Norvegujo kaj eksterlando: n. kr. 12,—.

*Anoncprezoj:* 1/1 paĝo kr. 150,—, 1/2 p. kr. 75,—, 1/4 p. kr. 40,—, 1/8 p. kr. 20,—.


## Trondheim kaj Stockholm

La norvegaj kaj la svedaj esperantistoj kongresos dum la pentekosto.

La kongresurboj estos Trondheim kaj Stockholm. Trondheim invitis vin en la pasinta numero de nia gazeto. En ĉi tiu numero Norvega Esperantista Ligo kunvokas al landa kongreso kaj prezentas la jarraporton pri la pasinta jaro, gravan raporton, kiun ni petas vin studi. Per ĝi vi havos ideon pri la vasta kaj ampleksa laboro farita de la norvega esperantistaro — kaj vi havos ion por diskuti en Trondheim.

Se vi anstataŭe iros al Svedujo, vi vidos — ankaŭ en ĉi tiu numero — ke vi estos bonvena ankaŭ en Stockholm!

*

## *Kreskanta kaso*

La Norda Stelo, la agema klubo en Hamar, sendis tre valoran pakaĵon da poŝtmarkoj, kiujn ni nun monigos. Koran dankon!

Grupo Esperantista en Trondheim donacis 100 kronojn al nia agado. La kaso kreskas. Por duono de ĉi tiu mono ni aĉetis pm., kiuj nun cirkulas inter norvegaj filatelistoj en kajeroj, kiuj portas la nomon de Norvega Esperantisto. Koran dankon!

Svedaj samideanoj daŭre estas fervoraj aĉetantoj de niaj saketoj. Tre popularaj montriĝis la polaj, grekaj, turkaj, hungaraj, finnaj kaj arabaj.

Kelkaj kluboj ricevis kvanton de niaj loteriaj saketoj por vendado, kaj kelkaj kluboj tre bone vendis! Fine ni memorigas pri la saketoj kun bildmarkoj nun haveblaj ĉe la redakcio. Ni havas tiajn saketojn diversprezajn: 4 kr., 5 kr., 6 kr., 10 kr., 20 kr., 25 kr.

Iom post iom ni fariĝis butiko. Kaj la kaso kreskas.

*JHR.*

*

**Sciigoj de N. E. L.**

*Taskotabelo por kluboj. — Aprilo:* Estrarkunveno planas la kunvenojn de la venonta monato. La kasisto sendas al N.E.L. kaj al la distrikto kotizojn kaj liston pri la malfruiĝintaj kaj eventualaj novaj membroj.

*La Liga Estraro.*

LA KONTORFONDAĴO

| | | |
|---|---|---|
| Pli frue ............ | kr. | 160,00 |
| Lotumado, | | |
| Sauda Esperantoklubb | » | 25,00 |
| S. Ebeltoft ........ | » | 25,00 |
| A. & G. Høibo ...... | » | 15,00 |
| Bj. Aandahl ........ | » | 35,00 |
| K. S. K. ............ | » | 50,00 |
| C. S. B. ............ | » | 10,00 |
| | kr. | 320,00 |

POR LA KOPIMAŜINO

| | | |
|---|---|---|
| Pli frue ............ | kr. | 85,00 |
| K. A. Tombre ...... | » | 10,00 |
| S. Ebeltoft ........ | » | 10,00 |
| | kr. | 105,00 |

Sinceran dankon al ĉiuj donacintoj!

## Kiam vi estis en Stockholm lastfoje?

*Stockholm ŝanĝiĝas.*

Tie kie antaŭ nelonge estis malnovaj domoj, kaj ĵus estis granda truo en la tero, tie vi vidas la provizoran novan parlamentdomon. Ĝi troviĝas tuj ĉe la moderna butikcentro ,kiu ankaŭ estas ŝatata loko por junaj homoj kun flugfolioj kaj politikaj slogantukoj.
Vi eble rekonos la urban domon de Stockholm. Sed ĉu ion alian?

La revido de Stockholm,
Jarkongreso de SEF.
Pentekoste 1971!

Esperantokongressen 1971
Gerdman
Sibyllegatan 83
S-114 43 Stockholm, Svedio.

## Nekrologo

S-ino ISBRUCKER

La 14-an de Januaro mortis, en aĝo de 83 jaroj, s-ino J. C. Isbrucker-Dirksen, Nederland, Honora Membro de UEA. Kun s-ro Andreo Csch ŝi fondis en 1930 la Internacian Cseh-Instituton de Esperanto.

*Bonvenon al Gotenburgo kaj . . . al Londono!*

La urbo Gotenburgo, mondkonata havenurbo ĉe la sveda Okcidenta Marbordo, tutan 1971 festas sian 350-jaran jubileon. En la kadro de la urba jubileo ni invitas vin al sestaga restado en amika, internacia Esperanto-rondo 24.—29. julio. Atendas vin interesa, varia kaj altkvalita programo.

Ĝustatempe okazos komuna ŝipveturo al la 56:a UEA-kongreso en Londono, favorpreze aranĝota por niaj gastoj kaj aliaj esperantistoj.

INTER-Agadgrupo por Esperanto
Box 55028
S-400 53 GOTENBURGO, Svedio
Telefono: (031) 48 95 97

P.S. Mendu ankaŭ novan turistan prospekton pri Gotenburgo en Esperanto, nepre skribante rekte al: Turista Oficejo, Parkgatan 2, S-411 38 *Gotenburgo,* Svedio.





# Elna Matland 50-jara

Unu el la plej dinamikaj esperantistoj en Norvegujo, Elna Matland en Sauda, pasos la 50-jaran mejloŝtonon la 28an de Aprilo. Elna Matland esperantistiĝis en 1939 en Bergen kaj tuj fariĝis unu el la plej aktivaj membroj de la tiea klubo. Poste ŝi transloĝiĝis kun sia same aktiva edzo al Sauda. Tra la jaroj ni trovas ŝin en preskaŭ ĉiuj eblaj oficoj de la movado, jen sekretario aŭ prezidanto de la klubo en Bergen, nun prezidanto de la klubo en Sauda, jen Fakdelegito, jen Delegito de U.E.A., jen en la estraro de Okcidenta Distrikto de N.E.L., jen konsilantarano de N.E.L.; dum vico da jaroj ŝi estis prezidanto de la ekzamena komitato en Bergen, nun prezidanto de la ekzamena komitato en Sauda. Ŝi estis la dua persono, kiu faris la instruistan ekzamenon de Esperanto en Norvegujo. Dum kelkaj jaroj ŝi estis ankaŭ prezidanto de la Instruista Faksekcio de N.E.L., kaj nun, por la dua fojo, ŝi gvidas la Gazetaran Servon de N.E.L.. Ankaŭ en S.A.T. ŝi aktivis. Aldonu sennombrajn kursojn, prelegojn, artikolojn en diversaj revuoj. Kiel popollerneja instruistini ŝi ankaŭ aktivas sur la instruista fronto. Ŝi ĉiam atentas eblecojn kaj ŝancojn por enŝovi Esperanton, kaj utiligas ilin, aŭ atentigas la estraron de N.E.L. pri ili. Certe multaj esperantistoj ne atingus dum cento da jaroj duonon de tio, kion ŝi atingis ĝis nun dum siaj kvindek!

Okaze de la grava jubileo ni sincere gratulas, dezirante al la jubileulino minimume kvindek pliajn, same aktivajn jarojn por nia alta celo.

*C. Støp-Bowitz.*

*

LA INTERNACIA FLOREKSPOZICIO

(Floralies Internationales) Ĉijare okazonta en NANTES (23/4—6/5) havos konstantan Esperanto-interpretiston. Vi do povas sendi informpetojn en Esperanto al: Commissariat Général des Floralies Internationales, 44-NANTES, Francujo.

La 2-an de majo la gesamideanoj povos viziti kune la ekspozicion post komuna tagmanĝo, Informpetu ĉe:

Nantes Esperanto, 13, Bd. de la Chauvinière, 44-NANTES.

*

*Survoje al UK en Londono*

ekkonu danan filozofion kaj danan ferian vivon. Pasigu la antaŭkongresan semajnon (24.7.—31.7. 71) en la feria centro KOSMOS en Danlando. Prelegoj kaj liberaj diskutoj pri esencaj demandoj de la vivo, i.a. pri Esperanto-problemoj. Feriado en bela naturo apud la maro. Ekskursoj al vidindaĵoj kaj historiaj lokoj. Vizitoj en danaj feriaj hejmoj, kie floras intereso pri humanismaj kaj internaciaj demandoj. Petu senpagan broŝuron ĉe Martinus-Instituto, Esperanto-Sekcio, Mariendalsvej 94—96, DK 2000 *Kopenhago F.*, Danlando.

# NORVEGA ESPERANTISTA LIGO

## Jarraporto 1970

ESTRADO

*La Liga Konsilantaro* dum la tuta jaro konsistis el:
Prezidanto: C. Støp-Bowitz
Vicprezidanto: Kjell Gustavsen
Ĝenerala sekretario: John Berggreen
Sekretario: Signe Korstvedt
Kasisto: Karl Ekhaugen
Estraranoj: Olav Rygg, Kirsten Ek
Anstataŭantoj: Harda Danielsen, Alfred Skyberg, la 3a loko vakis.
Ceteraj konsilantaranoj:
Lars Kåre Hunnes, Trondhejmo
Steffen Kjetland, Haugesund
Per Johan Krogstie, Løten
Elna Matland, Sauda
Herolv Olsen, Tromsø.
Revizoroj: John Selbekk, Karin Sandberg.

*Landa kongreso* ne okazis dum 1970.

ADMINISTRADO

*Estrarkunvenoj.* Okazis 7 estrarkunvenoj (7 en 1969) kaj oni protokolis 90 punktojn (90 en 1969).

*Cirkuleroj.* La Estraro elsendis al la klubo kaj distriktoj 5 cirkulerojn, i. a. kun invito al mendoj de donac- kaj propagandabonoj al Norvega Esperantisto, kaj pri la plano pri novaj aktivecoj. Cetere oni publikigis informojn al la membraro en la rubriko «Sciigoj de N.E.L.» en Norvega Esperantisto. 2 el la cirkuleroj estis sendataj ankaŭ al la rektaj membroj.

*Oficejo.* La tenado de la oficejo estas ebla nur per la malavara subtenado flanke de membroj per la oficeja fondaĵo (kontorfondaĵo). Pluraj pagas libervolan monatan aŭ jaron kontribuon. La oficejo servas samtempe por Eldonejo Esperanta A/S kaj por Klubo Esperantista en Oslo, kiuj pagas partojn de la luprezo. Ĉar la domo St. Olavsgt. 27 estas malkonstruota pro stratreguligo, oni serĉis kaj trovis alian ejon en General Birchsgt. 30, iomete pli grandan, kaj kun montrofenestro. La translokigo okazis en Decembro—Januaro. La malnovan oficejon en N. Slottsgt. 3 oni konservas kiel provizejon. La oficejon estris la prezidanto kunlabore kun la ĝenerala sekretario. Estis regula deĵoro tie dufoje semajne. La laboron dividis inter si la estraranoj. La Ligo, la Eldonejo kaj la Klubo havas komunan telefonon.

*La Oficeja Fondaĵo* dum la jaro donace ricevis kr. 2 048,03 (en 1969 kr. 1 401,35). La Estraro kore dankas al la kontribuintoj.

*La Financa Komisiono,* konsistanta el Kirsten Ek (prezidanto), John Berggreen, Johan Matland, Alfred Skyberg (membroj), ne laboris dum 1970.

*Kunlaboro kun N.E.F.A..* Daŭre bone funkcias la interkonsento kun Norvega Esperantista Fervojista Asocio. Ĝi disponas unu paĝon en ĉiu numero de Norvega Esperantisto kiel sian oficialan organon, ĉiuj membroj de N.E.F.A. estas abonantoj de Norvega Esperantisto, kaj la kaso de N.E.F.A. pagas kr. 400,00 kiel kontribuon al la preskostoj.

DISTRIKTOJ, KLUBOJ KAJ MEMBROJ

*Distriktoj.* Precipe Okcidenta Distrikto bone laboris, Orienta, Meza kaj Nordlanda Distriktoj estis malpli aktivaj. — Nord-Norvega Esperanto-Distrikto ne funkcias.

*Kluboj.* Je la jarfino 1969 N.E.L. havis 18 aliĝintajn klubojn. Neniu klubo fondiĝis, sed unu klubo malaperis. Je la jarfino N.E.L. sekve havis 17 klubojn.

Membrostatistiko:

| | |
|---|---|
| Bergen, La Esperantoklubo de, Ok.D. | 27 |
| Bodø Esperantoklubb, N.D. ...... | 12 |
| Gjøvik, Klubo Esperantista de, Or.D. | 5 |
| Halden, Ascendo, Or.D. .......... | 9 |
| Hamar, La Norda Stelo, Cr.D. .... | 14 |
| Harstad, Noktomeza Suno, N.N.E.D. | 5 |
| Haugesund, Mara Vento, Ok.D. .... | 46 |
| Jørpeland, Pacaj Batalantoj, Ok.D. | 5 |
| Kristiansands Esperantoklubb ...... | 14 |
| Løten, La tri verdaj steloj de, Or.D. | 11 |
| Mo, La Esperantoklubo de, N.D. .. | 5 |
| Odda, La Glaciaro, Ok.D. ........ | 5 |
| Oslo, Klubo Esperantista en, Or.D. | 143 |
| Sarpsborg, La Urso, Or.D. ........ | 19 |
| Sauda Esperantoklubb, Ok.D. .... | 18 |
| Tromsø, La Norda Lumo, N.N.E.D. | 7 |
| Trondhejmo, Grupo Esperantista, M.D. ...... | 29 |
| Sumo: | 374 |
| Individuaj membroj ............. | 136 |
| Entute: | 510 |

La mallongigoj post la nomoj de la kluboj montras la distrikton, al kiu la klubo apartenas.

Specifo de la membraro laŭ kategorioj:

Klubanoj:

| | | |
|---|---|---|
| Ordinaraj ................. | 270 | |
| Junulaj ................... | 29 | |
| Familiaj .................. | 54 | |
| Junaj familiaj ............ | 11 | |
| Honoraj ................... | 3 | |
| Dumvivaj .................. | 2 | |
| Subtenantaj ............... | 5 | |
| | | 374 |

Individuaj membroj:

| | | |
|---|---|---|
| Rekte aliĝintaj membroj ordinaraj ............... | 111 | |
| Rekte aliĝintaj membroj junulaj | 8 | |
| Rekte aliĝintaj membroj familiaj | 4 | |
| | | 123 |
| Dumvivaj membroj ............. | | 7 |
| Subtenantaj membroj .......... | | 6 |
| Entute: | | 510 |

Krome pagis 2 kontribuaj membroj. — Entute la membronombro montras malkreskon de 12 membroj, t. e. 2,3 % kompare kun la antaŭa jaro.

KLUBLABORO

*Superrigardo.* (Ĉar nur 11 el la 17 kluboj ĝis nun sendis ĉiujn devigajn raportojn, kelkaj el la subaj ciferoj certe estas tro malaltaj.) Suma mebronombro je la 1/1 1970: 382. Aliĝoj: 36, eksiĝoj: 44. Membronombro je la 31/12: 274. — Okazis 117 klubkunvenoj, meznombre ĉeestis proks. 50 %; estas raportita 90-procenta ĉeesto. — Raportiĝis 37 estrarkunvenoj, 15 festoj, ekskursoj k.t.p.. En 4 kluboj laboris 5 studrondoj kun proks. 25 membroj. 7 kluboj raportas pri biblioteko kun 378 volumoj. 76 klubanoj posedas elementan ekzamenon, 47 superan, 3 instruistan.

La kluboj grandparte kontentige raportadis, sed la estraro ankaŭ zorge urĝigis pri mankantaj raportoj. — La intereso inter la membroj grandparte ŝajnas esti bona.

*Teatra Sekcio,* gvidata de C. Støp-Bowitz, sendis distraĵojn al kluboj, kiuj petis pri tio.

*La aktiviga plano.* La ĝenerala sekretario elsendis unu plian cirkuleron, en kiu li pritraktis diversajn kampojn de aktivigo.

*Vojaĝsekretario.* La alvoko pri donacoj por financado de vojaĝsekretario daŭre ne donis sufiĉan rezultaton.

STUDLABORO

*Kursgvidantoj.* Neniu eksterlanda kursgvidanto agadis en la lando dum 1970, sed en kelkaj lokoj okazis kursoj gvidataj de lokaj fortoj.

*Kursoj.* Raportiĝis 10 kursoj por komencantoj kun sume 84 kursanoj en Hamar, Haugesund, Løten, Moi, Oslo kaj Tromsø, kaj 4 kursoj por progresantoj kun 24 kursanoj en Haugesund kaj Oslo. Kredeble okazis ankaŭ kelkaj kursoj, pri kiuj raportoj ne estas ricevitaj, aŭ kiuj je la jarfino ankoraŭ ne finiĝis.

*Korespondaj kursoj.* La Sekcio pri Koresponda Instruado estis gvidata de Else-Margrethe Müller, Trondhejmo. Estis bona kunlaboro kun «Folkets Brevskole», kiu uzas la kursojn de N.E.L., sed mem prizorgas administradon kaj anoncadon. N.E.L. havigas instruanton kaj ricevas raportojn pri lernantoj, kiuj plenumas la kursojn ĉe «Folkets Brevskole». Ankaŭ Norvega Blindula Asocio utiligas la kursojn. — Ĉe N.E.L. aliĝis al la unua parto 27 kursanoj, al la dua parto 8. Oni daŭre liveris la kursojn por reduktita tarifo al gejunuloj; 8 lernantoj en la unua kaj 3 en la dua parto estas tiaj. Ĉe «Fol-

kets Brevskole» aliĝis al la unua parto 14 kursanoj, al la dua neniu. — Neniu kursano estas varbita de la mebroj de N.E.L.. Ĉiuj, kiuj plenumis la unuan parton kaj ne jam estis membroj, ricevis duonjaran abonon al Norvega Esperantisto kaj proponon pri membreco. — Instruis E. Holten kaj L. K. Hunnes, por gejunuloj Ludvig Anjer, por «Folkets Brevskole» L. K. Hunnes, por blinduloj H. Karterud. — La kurso estis 2-foje anoncata en la semajna gazeto. «Hjemmet» dum la aŭtuno. — La provizo de la kursleteroj proksimiĝas al elĉerpiĝo, kaj la reviziita eldono per L. K. Hunnes estas preta por presigo.

*Gazeta kurso* aperis en 1970 en neniu gazeto.

*Perfektiga studado.* La Ekzamena Komisiono ankaŭ dum 1970 korektadis taskojn por interesiĝantoj. Oni aparte klopodas igi la membrojn studi por ekzameno.

*Ekzamenoj.* Ordinaraj ekzamenoj okazis en Majo en Oslo kaj Bergen kaj en Decembro en Oslo. 1 kandidato plenumis la elementan ekzamenon, 3 la superan. La Ekzamena Komisiono konsistas el: C. Støp-Bowitz (prez.), Olav Rygg (sekr.), Eva Støp-Bowitz (kas.), Jens Schjerve kaj Elfrid Vormdal (membroj). Ekzistas 6 lokaj ekzamenaj komitatoj, nome en Bergen, Haugesund, Sauda, Tromsø, Trondhejmo, Østfold, kaj 5 ekzamenaj delegitoj ekster la komitatoj.

## INFORMADO

*Informa Fako* (Komisiito pri Informado: Ludvig Anjer). La komisiito i. a. per sia speciala bulteno «Esperanto-Budstikke» instigis klubojn kaj unuopajn esperantistojn al varbada aktiveco kaj sukcesis igi klubojn utiligi la lokajn gazetojn por atentigo pri klubaj okazaĵoj. Cetere li dediĉis specialan atenton al la aranĝo «Semajno de Internacia Amikeco».

*La Propaganda Fondaĵo* ricevis donacojn de entute kr. 37,00. Bankinterezoj estis kr. 601,95. El la fondaĵo oni uzis kr. 2 359,85. La fondaĵo posedis je la jarfino kr. 10 318,40.

*«Esperanto-nytt».* Ankaŭ en 1970 la komisiito pri informado ne reaperigis tiun informbultenon.

*Informbroŝuroj.* De «Det internasjonale språket — Esperanto» restas proks. 2 500, de la flugfolieto restas proks. 10 000. — La faldfolio «Velkommen til Esperanto-bevegelsen» estas elĉerpita sed ankoraŭ ne reeldonita, pro manko de ilustraĵoj.

*Gazetara Servo,* gvidata dum la unua jarduono de Ludvig Anjer, dum la dua de Elna Matland, elsendis al ĉiuj norvegaj ĵurnaloj 8 bultenojn kun sume 17 novaĵoj pri Esperanto, parte pere de lokaj reprezentantoj. Oni daŭre abonis eltondaĵojn per la firmao «Argus». Oni registris 120 aperigojn de novaĵoj elsenditaj de la Gazetara Servo kaj 120 novaĵojn kaj 67 artikolojn, intervjuojn k.t.p. el aliaj fontoj. Entute oni do registris 307 aperigojn (311 en 1969) en 77 gazetoj kaj revuoj (81 en 1969), kvankam la Gazetara Servo ne funkciis dum 4 monatoj de la jaro. Atakoj al Esperanto ne okazis. Pluraj kluboj aperigis raportojn pri siaj kunvenoj kaj aliaj okazaĵoj en lokaj gazetoj.

*Radio* (Komisiito dum la unua jarduono: R. Bugge-Paulsen, dum la dua: Kirsten Ek). Otto Prytz enŝovis mencion pri Esperanto en intervjuon pri alia temo, la intervjuo estis ripetata en la «novjara kavalkado». Printempe Esperanto estis temo de divenkonkurso por junuloj, kaj en kombino kun tio C. Støp-Bowitz estis mallonge intervjuata pri la lingvo. En lokaj elsendoj Hans Amund Rosbach enŝovis priparolon de Esperanto en paroladeton, okazis intervjuoj kun Magnhild Undset, kaj kun Tamiko Kaŭakami. Cetere Esperanto estis kelkfoje menciata en aliaj programeroj. La Esperantaj radioprogramoj aperis dufoje en «Programbladet». En la televido ŝajnas ke nenio aperis.

*Interŝtataj organizaĵoj* (Komisiito: R. Bugge-Paulsen). Pri la skandinavia propono al UNESKO evidente daŭre laboras la svedaj UNESKO-komisiono kaj registaro. La Eŭropa lingvokampanjo daŭre stagnas post la morto de d.ro Herrmann. La komisiito denove kolektis proponantojn pri U.E.A. kiel kandidato por la Nobel-premio 1971.

*Blinduloj* (Komisiito Otto Prytz). La sonbenda eldono de Norvega Esperantisto, prizorgata de Rudolf Dreyer, havas 7 abonantojn, kaj Kluba Bulteno de Klubo Esperantista en Oslo estas daŭre surbendigata de John Berggreen por la blindaj membroj. En Trondhejmo estas en laboro brajla Esperanto-Norvega vortaro. Kelkloke oni ankaŭ okupiĝas pri surbendigado de Esperantaj libroj por la sonbenda biblioteko de Norvega Blindula Asocio.





*Skoltoj.* La komisiito, Hans Amund Rosbach, daŭre tenas kontakton kun interesiĝantoj, kaj la ĝenerala sekretario daŭrigis la aktivecon de Skolta Esperantista Ligo en Norvegujo pri distribuado de la lernolibro Jamborea Lingvo, cele al oficiala uzado de Esperanto dum la jamboreo en Tokio en 1971.

*Junularo.* La komisiito, Nils Chr. Stenseth, per cirkulero establis kontakton kun la junulaj membroj de N.E.L., kaj oni starigis Junularan Sekcion de N.E.L.. Oni interkonsentis kun Sveda Esperantista Junulara Unuiĝo ke ĝia organo, Kvinpinto, estu organo ankaŭ de la norvega junulara sekcio, sed aperis nur unu numero. La ĝenerala sekretario daŭrigis la kontakton kun la komunumaj junularaj kluboj en Oslo. Studenta Esperanto-Societo en Oslo aranĝis dum 3 tagoj je la komenco de ambaŭ semestroj standon en la Universitato kun ekspozicieto de libroj kaj disdonado de flugfolioj, kaj poste informan kunvenon por studentoj. La societo, kiu estas grupo de Klubo Esperantista en Oslo, havas 20 membrojn. Ĝi sukcesis igi «Studentenes Fellesråd» proponi al la Universitato en Oslo starigi instruadon pri Esperanto.

*Esperanto en la lernejojn* (prez. de la Komisiono por la Lerneja Kampanjo: C. Støp-Bowitz). Oni daŭre atendas iniciatojn de norvegaj instruistoj kaj lektoroj esperantistaj pri akiro de permeso por eksperimenta instruado de Esperanto en siaj lernejoj. — En la propono pri nova «Normalplano por la bazo lernejo» estas malfermita ebleco por instruado pri «alternativa fremda lingvo», kaj aliloke en la sama planpropono estas menciitaj kiel ekzemploj de elekteblaj temoj: «Swahili, Esperanto». Unu lernejo (Stortangen, Nordli) jam montris intereson alpreni Esperanton se la plano aprobiĝos sen ŝanĝo en la menciitaj punktoj. — La Universitato en Oslo akceptis ke unu studento eksterlanda prezentis sian ĉeftezon en Esperanto.

*Informaj prelegoj.* Raportiĝis nur 5 informaj prelegoj en Bergen, Hylkje i Åsane, Oslo, Tingvoll kun proks. 200 aŭskultintoj.

*Ekspozicioj* ne raportiĝis en 1970.

*Kinej-reklamo.* Ekde la 22a de Septembro 1969 ĝis la 20a de Septembro 1970 reklam-plato laŭ desegno de Johan Matland estis montrata laŭvice en ĉiuj 18 kinejoj de Oslo.

## DIVERSAĴOJ

*Norvega Esperantisto.*

La redakcia komitato konsistis el Johan Hammond Rosbach, Sarpsborg (ĉefredaktoro) kaj Hans Amund Rosbach, Kristiansund N.. La gazeto estis redaktata ĉefe laŭ la samaj principoj, kiel en 1969. Oni disponigis paĝon en ĉiu numero al N.E.F.A., kaj la «Fervojista paĝo», sub redakto de Odd Kolbrek, estis ŝatata legaĵo ankaŭ de nefervojistoj. La kunlaboro kun la presejo, A. Sæther, Hamar, estas bona, sed la numeroj ofte estas liverataj kun konsiderinda malfruo. La ekspedadon tre akurate prizorgis Randolf Grotmål. — Aperis 6 ordinaraj numeroj 16-paĝaj, sume 128 paĝoj. La enspezoj ne permesis eldonon de 10 plenaj 16-paĝaj numeroj. Per «poŝtmarka iniciato» la ĉefredaktoro pli ol kovris la elspezojn de la redakcio.

*«Pro Merito».* Ordena promocio ne okazis dum 1970.

*Biblioteko.* La pruntedoneblaj libroj daŭre staras en la oficejo de N.E.L., la ceteraj estas sekure magazenitaj. La kresko de la biblioteko ĉefo rezultis el recenzekzempleroj, kiujn ricevis Norvega Esperantisto, kaj gazetoj ricevataj interŝanĝe kun ĝi. Pruntedoniĝis nur 8 libroj.

*Nordlanda kunlaboro.* Nordlanda Esperanto-Komitato daŭre ne montris aktivecon. Sed la Kunlabora Komisiono konsistanta el la prezidantoj de la 4 landaj asocioj (Danujo, Finnlando, Norvegujo kaj Svedujo) kunsidis en Marto en Kopenhago diskutante multajn punktojn de granda graveco por la plua laboro en niaj landoj; i. a. oni decidis daŭrigi la kolektadon de subskriboj al la peticio al

U.N.O., precipe inter parlamentanoj kaj aliaj aŭtoritatuloj (la danoj jam akiris subskribojn de pli ol la duono de siaj parlamentanoj, kio metis la movadon en Danujo en tute novan pozicion).

*«Reisetrafikkforeningen for Oslo og Omegn».* La kunlaboro kun tiu asocio estas bona. Pluraj kopioj de ĝiaj filmoj «Bonvenon al Oslo» kaj «Oslo, la vikinga ĉefurbo» kaj de la diapozitivoj kun akompana prelega teksto daŭre cirkuladas en la mondo. Oni daŭre distribuadis la turistbroŝuron al petintoj en diversaj landoj.

*Norvega Ŝtata Fervojo* aperigis, laŭ iniciato de Per Johan Krogstie, Esperantan eldonon de sia filmo «Mi estis tie» en 5 kopioj, kiuj cirkuladas en la mondo.

*Turisma Servo de N.E.L.,* sub gvidado de Kirsten Ek, peris informojn kaj aliĝojn por la norvegaj anoj de la kongreso en Vieno kaj aranĝis karavanon al la kongreso. — Aŭtune oni dissendis informojn pri la 56a Universala Kongreso en Londono.

*Internacia organizo.* La kunlaboro kun U.E.A. estis kontentiga. Ĉefdelgito por Norvegujo estas Alfred Skyberg, Komitatano A por N.E.L. estas Ludvig Anjer, C. Støp-Bowitz estas Komitatano B. R. Bugge-Paulsen funkciis kiel anstataŭanto por Ludvig Anjer en la Komitatkunsidoj dum la kongreso en Vieno. En 1970 estis 59 Delegitoj en 20 lokoj en Norvegujo. La nombro de Individuaj Membroj de U.E.A. estis 85.

*55a Universala Kongreso de Esperanto* okazis en Vieno. Aliĝis, laŭ la akiritaj informoj, 16 norvegoj. La Norvegan Registaron reprezentis R. Bugge-Paulsen, reprezentanto de N.E.L. estis Th. Resberg.

*Prelegvojaĝo.* En Februaro-Marto la japanino Tamiko Kaŭakami faris grandan prelegvojaĝon tra orienta, okcidenta, suda, meza kaj norda Norvegujo, kaj ŝia agado en la plej multaj lokoj estis tre sukcesa.

*Helpagado.* Oni daŭrigas la kunlaboron kun Moçambiko kaj kun Esperantista Asocio de Madagaskaro.

*«Vivo de Zamenhof».* La transprenita stoko de la norvega eldono de Privat: «Vivo de Zamenhof» estas disvendata por kr. 3,00, sed la disvendado okazas malrapide.

*Semajno de Internacia Amikeco.* Ankaŭ en 1970 la aranĝo vekis intereson inter la membroj en multaj lokoj.

*Kartoteko pri norvegaj esperantistoj.* La kartoteko enhavas nun 10 059 slipojn pri esperantistoj en 786 lokoj.

*Koresponda statistiko.* N.E.L. kun ĉiuj sekcioj dum la jaro ricevis 1 357 leterojn kaj 1 029 presaĵojn kaj sendis 1 207 leterojn kaj 3 093 presaojn.

*La intereso pri Esperanto* ŝajnas esti kreskanta, se ni juĝu laŭ la nombro da informpetoj, kiujn ricevadas la oficejo post ĉiu iom rimarkinda okazaĵo, gazetartikolo k.t.p.. Niaj respondoj ofte rezultigis mendon de lernolibro aŭ koresponda kurso. La tendenco al iomete pli vigla aliĝado al kursoj ŝajnas daŭri. Ni konstatas ankaŭ kreskantan komprenon pri nia ideo ĉe aŭtoritatuloj.

*Konkludo.* Tamen 1970 denove montras malkreskon de la membronombro, kiu nun estas danĝere malalta. Nia membraro konsistas nun ĉefe el maljuniĝantaj fideluloj. La perdo ne estas nenormale granda, sed la alfluo de novaj adeptoj estas tute malsufiĉa. Per artikoloj en Norvega Esperantisto la estraro detale pritraktas la unuopajn partojn de la laborplano de N.E.L., esperante veki la membrojn al iniciato. Ni *devas* esti pli multnombraj por povi akcepti kaj adekvate eluzi la atendatan favoron flanke de lernejoj kaj aliaj aŭtoritatoj.

Oslo, la 31an de Decembro 1970 / la 22an de Februaro 1971

*C. Støp-Bowitz* — *Kjell Gustavsen*
*John Berggreen* — *Signe Korstvedt*
*Karl Ekhaugen*
*Olav Rygg* — *Kirsten Ek*





## JARKALKULO DE NORVEGA ESPERANTISTA LIGO

*Spezoj 1970*

| | | |
|---|---|---|
| *Enspezoj:* | | |
| Klubkotizoj | | 2 895,50 |
| Rektaj membroj | | 1 827,50 |
| Norvega Esperantisto, membro-abonoj | | 4 300,00 |
| Norvega Esperantisto, rektaj abonoj, anoncoj, kontribuo | | 1 829,20 |
| Rentumoj | | 147,36 |
| Donacoj, lukontribuo | | 2 648,03 |
| El la kontorfondaĵo | | 325,97 |
| El la kapitalo: manko | | 541,89 |
| *Elspezoj:* | | |
| Kostoj | 1 678,63 | |
| Amortizo | 250,00 | |
| Norvega Esperantisto | 7 705,17 | |
| Luado | 2 974,00 | |
| Afranko | 711,15 | |
| Gazetara Servo | 588,00 | |
| Kotizoj al U.E.A. | 435,00 | |
| Kotizoj al la Distriktoj | 173,50 | |
| | 14 515,45 | 14 515,45 |

## BILANCO JE 31/12 1970

| | | | | |
|---|---|---|---|---|
| *Aktivaĵoj:* | | | | |
| En la kaso | | 653,65 | | |
| Poŝtĝirokonto 100.30 | | 1 100,69 | | |
| Meblaro | 2 536,88 | | | |
| ÷ amortizo | 250,00 | 2 286,88 | | |
| «Pro Merito» | | 176,09 | | |
| 253 akcioj en Esperantoforlaget A.s | | 5 566,00 | | |
| 5 akcioj en «Agado» | | 50,00 | | |
| Debitoroj: | | | | |
| Prop.fond. en Oslo | | | | |
| Sparebank | 10 318,40 | | | |
| Andresens Bank | 6 199,38 | | | |
| Div. debitoroj | 806,79 | 17 324,57 | | |
| *Pasivaĵoj:* | | | | |
| Div. kreditoroj | | | | 4 108,82 |
| La kontorfondaĵo | | | 2 462,83 | |
| + donacoj | | | 2 048,03 | |
| | | | 4 510,86 | |
| ÷ lupago | | | 2 374,00 | 2 136,86 |

| | | | |
|---|---|---|---|
| «Esperanto-nytt» ................ | | | 3 465,76 |
| La Propaganda Fondaĵo ............ | | 12 039,30 | |
| ÷ donacoj 1970 ................. | | 37,00 | |
| + rentumoj .................... | | 601,95 | |
| | | 12 678,25 | |
| ÷ elspezoj .................... | | 2 359,85 | 10 318,40 |
| Konservataj klubkasoj ............ | | | 1 059,00 |
| Garantifondaĵo dumvivaj membroj .. | | | 1 242,00 |
| Kapitalo ...................... | | 5 368,93 | |
| ÷ manko ...................... | | 541,89 | 4 827,04 |
| | 27 157,88 | | 27 157,88 |

Oslo, la 31an de Decembro 1970 / la 22an de Februaro 1971

*Karin Sandberg, John Selbekk*
Revizoroj

*Karl Ekhaugen*
Kasisto

LA KORESPONDAJ KURSOJ
(Avdeling for Brevundervisning)
*Spezoj 1970*

| | | |
|---|---|---|
| *Enspezoj:* | | |
| Kurskotizoj ................................ | | 615,00 |
| Rentumoj .................................. | | 218,64 |
| *Elspezoj:* | | |
| Studmaterialoj kalkulitaj .................... | 370,00 | |
| Kostoj ..................................... | 288,20 | |
| Afranko .................................... | 91,75 | |
| Profito, al la kapitalo ...................... | 83,69 | |
| | 833,64 | 833 64 |

BILANCO JE 31/12 1970

*Aktivaĵoj:*

| | |
|---|---|
| En la kaso ................................ | 23,39 |
| Poŝtĝirokonto 100.33 ....................... | 1 967,18 |
| Poŝta Ŝparkaso ............................ | 2 122,12 |
| Forretningsbanken .......................... | 4 020,80 |
| Studmaterialo .............................. | 2 300,13 |





*Pasivaĵoj:*

| | | | |
|---|---|---|---|
| Kapitalkonto je 1/1-70 ........... | 10 349,93 | | |
| + profito 1970 ................. | 83,69 | | 10 433,62 |
| | | 10 433,62 | 10 433,62 |

Årets balanse er satt opp etter kassa-dagbok med bilag, som er revidert. Postgirokonto-oppgave og bankbøker er fremlagt og stemmer med ovenstående tall i status.
Trondheim, den 18. februar 1971.

*Else-Margrethe Müller*
kasistino

*Erling Anker Haugen*
revizoro

## 56-a Universala kongreso de Esperanto.

**Londono, 31. 7. - 7. 8. 1971.**

*Problemo de lingva komunikado*

Por la ĝenerala kunveno de la 56-a UK, la Estraro de UEA elektis la temon «La problemo de lingva komunikado en la nuntempa mondo» kun la subtitolo «La pozicio de la grandaj naciaj lingvoj kompare kun la neŭtrala Esperanto kaj perspektivoj por la estonteco.» Por tiu kunveno oni intencas inviti reprezentantojn de ekzemple British Council, Goethe-Institut, la komitato por la propagando de la franca lingvo, la lingvistikaj institutoj de la Soveta kaj Ĉina Akademioj, Unesko k.a. Tiukaze la kunveno povus havi formon de forumo kun interpretado.

*Delikata debato-temo?!*

«Neŭtraleco de UEA — ĉu la nuna laŭstatuta koncepto estas adekvata?» Jen la temo de tre popularа kongresa programero, kiu sendube elvokos atenton de ĉiu esperantisto, kiu sincere deziras kontribui al firmigo de la pozecio de UEA en nia tre komplikita kaj malkvieta mondo.

*Gejunuloj konkursos en la parolarto*

Monpremioj de 40 ĝis 100 ned. guldenoj atendas la partoprenontojn de la ĉijara Oratora Konkurso de la Universala Kongreso. Ĉu kaptos ilin unu el la temoj?

Daŭr. p. 47.

**HELSINGØR**

*40-jara feria kursaranĝo*


La internaciaj feriaj Esp-kursoj de Helsingør okazos 25/7—1/8 en La Internacia Altlernejo (tute moderna). Venu al Danlando por ĝui belan ferio-semajnon en vere Esperanta rondo kaj por partopreni nian 40-jaran jubilean aranĝon. Prospekto senpage havebla ĉe

L. FRIIS
Ingemannsvej 9,
DK - 8230 *Åbyhøj*, Danlando.

NB. Aŭtunaj feriaj Esp-kursoj okazos en la altlernejo JUNAJ HEJMO ĉe Århus, Danlando, 17.-23.10. 1971. Programo baldaŭ havebla ĉe L. Friis.

# FERVOJISTA PAĜO

ORGANO DE NORVEGA
ESPERANTISTA FERVOJISTA
ASOCIO – NEFA
Kaldbakkstubben 22, Oslo 9
Redaktoro: Odd Kolbrek,



## La Setesdallinio.

La 20-an de julio 1890 la norvega parlamento decidis konstrui mal-larĝ-ŝpuran — 1067 m.m. — fervojon de Kristiansand al Byglandsfjord. Ĉi tiun decidon oni faris, post kiam inĝenier-kapitano Peter Krag (la patro de la verkisto Wilhelm Krag) gvidis la propagandon por konstrui fervojon laŭ la valo Setesdalen. La preparlaboro komenciĝis en 1891 kaj la solenan inaŭguron de la laboro faris Reĝo Oscar II la 22-an de julio 1891. La 26-an de novembro 1895 la linisekcio Kristiansand—Hageland provizore malfermiĝis por trafiko. La 25-an de novembro 1896 la tuta linio inaŭguriĝis. La inaŭgurtrajno forlasis Kristiansand je la 8,15a kaj alvenis al Byglandsfjord je la 12a. Tie la ŝtatministro Hagerup inaŭgurparoladis.

La 27-an de novembro komenciĝis la ordinara trafiko, kaj laŭ la horaro trafikis potage 3 trajnoj ambaŭdirekte.

Dum la unuaj 20 jaroj la linio donis profiton, sed ek de la budĝetjaro 1917—18 alvenis la efiko de la milito, la elspezoj grandiĝis kaj la linio ekdonis malprofiton. Dum la jaroj 1920—30 la aŭtomobiltrafiko ek-konkuris la fervojon kaj ne sukcesis redoni al ĝi la antaŭan pozicion kiel profitdona linio. Dum multaj jaroj okazis komuna trafiko kun la vaporŝipoj sur la Byglandsfjordo, sed ĉar oni elkonstruis kaj plibonigis la vojojn, la aŭtomobiloj transprenis la trafikon de la ŝipoj. Le ĉefaj produktoj transportitaj per la fervojo estis lignaĵo, feldspato kaj kvarco. Laŭ la malsupra parto de la linio estis la produktoj de la Hunsfossfabriko, kiuj ĉefe transportiĝis. Kiam la nikelorafinejo en Evje devis ĉesi post la lasta milito, foriĝis esenca trafikbazo. Feldspato, ĉarpentlignaĵo kaj trunkaro transportiĝis per kamionoj rekte al la konsumejo. La militistkaserno en Evje ĉiam alportis al la fervojo multe da trafiko, same ankaŭ faris la elektroestablaĵoj laŭ la rivero Otra, laŭ kiu la linio iras supren al Byglandsfjord. La elektroestablaĵoj ankaŭ kaŭzis, ke granda parto, entute 11,2 km de la linio alikonstruiĝis al normalŝpuro. Diskutiĝis plano pri normalŝpuro por la tuta linio laŭ planoj en 1926 pri alikonstruado al normalŝpuro de la sekcio Kristiansand—Grovane, kiu fariĝis parto de la Sørlandlinio.

La ekonomia situo en la lando estis malbona en ĉi tiuj jaroj. Oni elektis la plej malmultekostan alternativon: Normalŝpuro Kristiansand — Grovane, kiu ekaplikiĝis la 14-an de majo 1938, kaj mallarĝŝpura Setesdallinio, kiu tiam estis mallongigita kun 20 km.

La plano pri alikonstruado al normalŝpuro ree diskutiĝis en 1944, kaj la ebleco por plilongigo de la linio al Ustaoset en la Bergenlinio esploriĝis. Ĉiujn fervojplanojn oni lasis al prijuĝo de «La granda fervojkomisiono de 1949». La plimulto de la komisiono voĉdonis por alikonstruo, sed la antaŭrajtlisto ne sufiĉis. La Ĉefestraro de N.S.B. malkonsente rekomendis, ke la trafiko laŭ tiu linio ĉesu. La 1-an de septembro 1958 presentiĝis raciigplano, kiun la parlamento traktis en januaro 1960. Ĝi enhavis gravan parton pri malprofitdonaj branĉlinioj. Por la Setesdalslinio la problemo fariĝis kiel alternativo, ĉu alikonstruado, ĉu trafikĉesigo. La 13-an de junuaro 1960 la parlamento kun granda plimulto decidis, ke la 1-a de septembro 1962 estu la lasta trafiktago.

La Setesdalslinio defendis sian rolon kiel ĉeftransportrimedo por la valo dum preskaŭ 30 jarojn. Dum la lastaj 30—40 jaroj la teknika evoluado de la aŭtomobiloj kaj la plibonigo de la vojoj kaŭzis, ke la transporto per la fervojo iom post iom malgrandiĝis. Dum la printempo 1963 la malmuntado de la linio estis preta.

Certe apartenas al la historio de la Setesdallinio, ke 4,7 km de la linio ne malmuntiĝis. Restas ankaŭ 3 vaporlokomotivoj, 3 pasaĝervagonoj. 1 poŝtvagono, 2 motorvagonoj, varvagono, neĝplugvagono, pluraj drezinoj kaj 2 motordrezinoj. Pere de ĉi tiu restaĵo de la Setesdalslinio hobiklubo prezentas vivantan muzeon. Per antikva trajno oni faras 2 vojaĝojn ĉiujn dimanĉojn dum la somermonatoj. Plurajn detalojn pri la Setesdalsfervojo vi ricevos, se vi skribos al: Setesdalsbanens Hobbyklubbs sekretariat, V. Strandgt. 33, 4600 Kristiansand.

*56-a Universala* . . (daŭr. de p. 45)

Ĉu la nuna junularo estas pli aŭ malpli idealisma ol la antaŭaj junaj generacioj?»

«Ĉu ekzistas jam bazaj elementoj de tutmonda kulturo?»

«Nacia lingvo vaste uzata internacie kaj lingva imperiismo.»

*Kongresa lunĉo*

Tuj post la solena Inaŭguro en Royal Festival Hall okazos samloke Kongresa Lunĉo. Tiu ĉi aranĝo, nun la unuan fojon provota, estas vere rekomendinda. Kvankam oni nomas ĝin Lunĉo, temas efektive pri tagmanĝo, kun tri pladoj kaj kafo por la prezo de 20 ned. gld. Krome okazos la tradicia Bankedo. Detaloj aperos en la Dua Bulteno.

*Praktika reklamaĵo*

Kiel ĵus komunikite el Londono, la granda angla firmao Marks & Spencers decidis donaci al la kongreso 2 500 plastajn butikumsakojn kun reklamteksto en Esperanto.

*27-a IJK informas*

En Edinburgo, Skotlando, rapide progresas la aranĝoj por la 27-a Internacia Junulara Kongreso de TEJO. Aperis la kongresa afiŝo kaj unua bulteno. Favora kotiz-tarifo validas ĝis la 30-a de aprilo 1971. Oni povas aliĝi ĉe Ian Parker, sekretario de la LKK, 22c Newbattle Terrace, Edinburgh, EH10 4RT, Britujo.

*Aŭtomobilistoj atentu*

La Loka Kongresa Komitato atentigas ĉiujn, kiuj intencas uzi sian aŭtomobilon dum la kongreso, ke ne ekzistas ebleco parki atomobilojn ĉe la Kongresejo. Oni rekomendas lasi aŭtomobilon aŭ ĉe la hotelo aŭ ekster la urbocentro kaj uzi la servojn de la publikaj transportiloj, t.e. subtera fervojo (Underground) aŭ aŭtobuso.

*Statistiko (30.1.1971)*

Argentino 5, Aŭstralio 5, Aŭstrujo 11, Belgujo 24, Brazilo 1, Britujo 287, Bulgarujo 46, Ĉeĥoslovakio 5, Danlando 19, Finnlando 40, Francujo 129, F.R. Germanujo 83, Grekujo 2, Hispanujo 30, Hungarujo 8, Irlando 2, Islando 2, Israelo 6, Italujo 39, Japanujo 15, Jugoslavio 20, Kanado 9, Koreujo 2, Nederlando 86, Norvegujo 20, Nov-Zelando 1, Pollando 7, Portugalujo 3, Sovetunio 1, Svedujo 59, Svisujo 12, UAR 2, Usono 25. Entute 1 006 aliĝintoj el 33 landoj.

# Norvega Kroniko

### Oslo

Estis la unua kunveno en 1971, kaj la prez. Annalise Torgnes bonvenigis la ĉeestantojn, dezirante al ĉiuj feliĉan kaj prosperon novan jaron.

Ludvig Anjer parolis pri la Semajno de Internacia Amikeco, iniciatita antaŭ 2 aŭ 3 jaroj de Eric Carlén, vic.prez. de U.E.A. L. Anjer diris ke la plej grava principo de la Semajno ne estas speciala afero inter la esperantistoj, sed la celo estas krei kaj akceli la amikecon internacie. Ĉi tiun jaron la Semajno okazos 21.—27/2.

C. Støp-Bowitz informis ke la kontoro de N.E.L. nun troviĝas en General Birchsgt. 30.

La ĉefpunkto de la programo estis prelego de Danuta Kubiak pri la temo «Kio estas Jogo?» En la sanskrita lingvo Jogo signifas ekvilibron absolutan inter du ekstremaĵoj ,la interna kaj la ekstera. Nur post kiam homo troviĝas en anima kaj korpa ekvilibro ĝi povas atingi kontenton kaj feliĉon, kio ja estas la celo de ĉiu vivanta estaĵo. Jogo havas 3 celojn: evoluo de la korpo, evoluo de la menso kaj evoluo de la animo. La preleganto klarigis kiel atingi la celojn de Jogo, pri vivmaniero, ekcerzado, manĝado k.t.p. Jogo estas vivo — vivsinteno; oni ne praktikas ĝin — oni vivas ĝin.

Raportis *Harda Danielsen.*

NORSK ESPERANTO-FORBUND
*(Norvega Esperantista Ligo)*

Postadresse: Boks 942, Oslo. Postgiro 100.30
Kontoradresse: General Birchs gate 30, Oslo
Telefon: 69 14 39
Kontortid: Tirsdag og fredag 15.30-16.30

*Turisma Servo:* Boks 942, Oslo
Postgiro 100.32

ESPERANTOFORLAGET A/S
*(Eldonejo Esperanto A/S)*

Postadresse: Boks 942, Oslo. Postgiro 100.30
Kontoradresse: General Birchs gate 30, Oslo
Telefon: 69 14 39

*Ĉefdelegito de U.E.A.:*
S-ro Alfred Skyberg, Østensjøvn. 118 a, Oslo 6. Postgiro 133.29

*La redakcio:*
Johan Hammond Rosbach,
Hulderveien 17 B, N-1700 Sarpsborg.
Telefono: 54 727

*Ekspedejo de Norvega Esperantisto:*
Boks 942, Oslo 1.

Trykt hos A. Sæther A.s - 2300 Hamar